VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského klubu v Mnichově Hradišti,
pro členy a příznivce mezinárodního jazyka.
Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště, Družstevní 1161
Cena: dobrovolný příspěvek
Podávání novinových zásilek povoleno Oblastní správou pošt Střední Čechy v Praze,
čj.P/Fiš-2295/92 ze dne 16.XI.1998

KRISTNASKA NUMERO

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Numero 1 Januraro 1994 leden Číslo 1

xmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmxmx

Ĉu vi kapablas argumenti por Esperanto? (Daŭrigo) Ni staras antaŭ plua argumento, kiam niaj kontraŭuloj asertas, ke Esperanto estas lingvo morta, artefarita, naivanta. Tion ili papagas (papouškují) dum longaj jardekoj, dum kiuj Eo pacience evoluiĝis. Latina lingvo ne trovante praktikan uzon krom papaj (papežské) enciklikoj mortis kaj ne estas kapabla esti uzata en praktika vivo. La pruvoj modernigi ĝin ĉiam fiaskis. Ekzemple la terminon „lokomotivo“ la reformistoj kapablis traduki kiel „maŝino sur fera vojo movpelata per vaporo“. Niaj kontraŭuloj ne volas rekoni E-on, asertante pro nescieco, ke ĝi ne estas kapabla esprimi ĉion, kion la homo pensas en detalaj nuancoj kaj taksas ĝin pro tio „primitiva“. La primitiveco dependas de la lingvoscio. Por normala interhoma kontakto ni uzas vere lingvon primitivan; tamen ĝi kapablas esprimi ĉion, kion alportas la ĉiutaga vivo. Tiusence ne estas ideo aŭ penso, kiun sen granda pripensado Eo ne kapablas traduki. Restas la problemo de Eo kiel literatura lingvo. La belsonecon de fremda lingvo oni kutime taksas laŭ vasteco de la vortprovizo (slovní zásoby), vorta riĉeco, kiu ebligas konstrui versojn, arton belsone esprimiĝi. Por tiaj celoj evoluiĝis aliaj lingvoj dum longaj jarcentoj. Tamen Eo ja ankaŭ ne plu estas novaĵo kaj tiudirekte dum sia jarcenta uzo evoluiĝis. Por apero de nova termino aliaj lingvoj bezonis multaj longajn jarojn. Poetoj kaj aliaj lingvistoj sentante iun mankon abundis (oplývali) per proponoj de novaj terminoj, neologismoj. Pri ĉiu termino, kvankam ofte nekonacie kaj ne publike, estis gvidataj multaj dueloj (souboje). Venka estis termino, kiu trovis pli grandan eĥon en literaturo. Pli malforte subtenataj terminoj per natura vojo malaperis kaj la vivaj terminoj transiris en la ĉiutagan vivon. Tiel ekestis (vznikl) poeta lingvo, de multaj riproĉata, tamen gvidata al esprima pliriĉiĝo. Batalo inter favorantoj de neologismoj kaj fundamentistoj estos daŭra inter niaj vicoj. Tamen taksu ĝin sobre – ĝi estas vere necesa por plua evoluo de la literatura lingvo. Sen literatura lingvo nia internacia lingvo estus morta. Ni ja povas fieriĝi per kvalitaj tradukoj de mondkonataj verkoj kaj ankaŭ de sciencaj verkoj, kiuj havas sian lokon en la monda literaturo. Por ke ne estu la batalo por enkonduko de la nova termino ĥaosa gardas nia Akademio, kiu havas reguligan rolon. Ĉidirekte ignoras la lingvan mondan situacion nevolante agnoski, ke la gvidan rolon transprenis la angla lingvo.

Ili scias nenion pri la interna ideo de Eo, kiu arigas ĉirkaŭ si tipon de homo aktive sopiranta pri interkompreniĝo ne nur lingve, sed ankaŭ kondute. La granda ideo de pacigo de animoj prezentas sin ne nur en publika medio, sed ankaŭ en ĉiu esprimo de homa konduto kaj bonvololemo, kiu estu inter esperantistoj ne nur tutmonde, sed precipe inter najbaraj nacioj, en familioj kaj en ĉiuj homaj interrilatoj. Komence estis la VORTO (kiel diras la biblio), ĉikaze (v tomto případě) esperanta, naskita en idealismo. Nobeligis ĝin persekutado de totaliteco post kiu ĝi revivantiĝis. Ĉiu rimedo por homa interkompreniĝo estas allasebla, eĉ per gestoj kaj per frapado kontraŭ prizonaj muroj. La verda koloro de Eo signifas naturon kaj esperon.

Eĉ la evoluantaj landoj ne akceptis E-on – opinias pesimismuloj. La praktika bezono de interkompreniĝo en koloniaj ŝtatoj kaj areoj de influo de la angla gvidis al kreado de dominiaj konvenciaj dialektoj, elkreskitaj spontane, tamen havantaj trajtojn de formeco kaj gramatika konstruo, kia estas ekzemple „Pidgin English“ sur la ĉina bazo, ĉirkaŭpreninta Azion kaj transirinta eĉ en Aŭstralion. Ankaŭ kreiĝis aliaj lingvaĵoj, bazantaj sur arabaj kaj aliaj lingvoj. Tio estis stimulo por sciencistoj el Cambridge en la jaroj 1926-1930 prilabori „Basic English“ nombranta 850 vortojn (600 substantivojn, 150 adjektivojn, 100 verbojn k.a.). Tamen ĝi portas ĉiujn trajtojn de simpligita lingvaĵo. Ekzemple en traduko de Gulivero: kiam li forprenas de liliputojn la ŝipojn, ili superŝutas lin per amaso da „pointed sticks“ (=akrigitaj bastonetoj), ĉar por la substantivo „sago“ inter la substantivoj (600) de Basic English mankis loko. La ĉiutaga angla lingvo nombras nun ĉ. 60000 vortojn. Kaj tamen Basic English plenumis ĝis tioma grado sian praktikan rolon, ke en la j. 1943 Roosevelt kaj same Churchill opiniis necese antaŭpuŝi ĝian instruadon. La brita registraro aĉetis de la aŭtoroj kopirajton, rekomendis uzi ĝin kaj ĝis la j. 1947 oni disvastigis 2000 titolojn en 2,5 milionoj da ekzempleroj. Kompreneble Basic English nek kapablas kontentigi la kulturajn bezonoj, nek povas iri ekster kvadron de la angla lingvo. Tamen ĝi montras eblon de praktika solvo de la praktika uzo kaj solvo de la problemo precipe al ni, esperantistoj, kiuj povas nur ĝemi kaj sopiri pri tia subteno. Tamen la procezo de okcidentaligo de la mondo per uzo de la angla estis bremzita per rezisto de la tia mondo kontraŭ imperielisma doktrino de subiĝo lingva kaj kultura, kaj sopiro pri prezentado de propra kulturo. Ankaŭ la pola soldato ekziliinta en Anglujon estis starigita antaŭ problemon de rapida lerno de la angla kaj solvis ĝin en fermitaj siaj korpusoj per kreo de propra lingvaĵo t.n. „pinlish“ (polish-english). La provoj krei similan sistemon multiĝas. Tia estas publikaĵo aperinta en Japanujo, titolita „The Simplest Auxiliary Languege BAMB“. La aŭtoro proponas lernolibron de nova lingvo kun ellaborita sistemo de gramatiko kaj kun vortaro ĉerpanta el vortoprovizo de fororientaj lingvoj. Povus esti, ke por Azio kaj Oceanio tiu provo povus ludi tian rolon, kiel Eo por hindoeŭropaj landoj. Tamen ĝi ne trovis sufiĉan eĥon kaj falis en forgeson.

Multaj malamikoj de Eo asertas, ke „Eo kiel historia provo ne plu havas ŝancon transvivi“, tro frue entombigante ĝin. Dum en erao de totalismaj reĝimoj Eo enhavis pro persekuto odoron de malpermesita frukto, sopiron pri interhomaj kontaktoj translimaj, eĉ se ofte primitive motivigitaj per interŝanĝo de diversaj objektoj k.s., nun tutmonda ekonomia problemaro fermas senbrue limojn por pli nobla agado, kulturaligo, amikecoj k.s.. Eo travivis kaj superombris aliajn lingvojn internaciajn. Tio pledas por Eo. La provo de tempo ĝi eltenis bone. Kvankam ne tiel rapide, kiel ni atendis, iom post iom ĝi estis ensuĉita en sferon de vivanta mondo kaj per tio ĝi fariĝis viva elemento.